

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 1/2003
Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Februaro 2003

This issue of *Esperanto USA* is brought to you through the selfless support of Peggy Dolter and Ellen Eddy.

Look inside for:

| | |
|--------------------------------|--------------|
| World Federalism | 2 |
| Paid Members ... | 3 |
| Revigliĝo | 4 |
| A Stronger Esperanto | 5 |
| USEJ | 5 |
| New Book by Sylvan Zaft | 6 |
| New Books | 8-9 |
| Korespondantoj | 10-11 |

LOU HARRISON 1917-2003

Ni informiĝis, ke la 2an de februaro 2003 forpasis la konata komponisto kaj esperantisto, Honora Membro de ELNA Lou Harrison, je aĝo 85-jara.

Ni esperas povi pli bone informi vin pri tiu bedaŭrinda malapero en la posta numero de *Esperanto USA*.

Festu la komencon de la sekvaj kvindek jaroj de ELNA!

Venu al Bostono ĉi-somere (3-6a de julio 2003) por festi en Esperanto kun aliaj Esperantistoj el Usono kaj la mondo. Ja estos festa etoso, ĉar ni invitas Esperanto-muzikistojn el Eŭropo veni kaj koncerti por ni kaj alporti al ni la senton de internacia Esperanto-kongreso. Ja estos internacia sento, ĉar la kongreso okazos proksime de kaj tuj antaŭ la fama Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) kiu venigas internaciajn lernantaron kaj instruistaron, el kiuj ni esperas multajn allogi al nia kongreso. Kaj kun la muzikistoj kaj niaj najbaraj kanadaj amikoj plurlingvaj, certas esti internacia etoso.

Kompreneble estos ankaŭ seriozaj aferoj. Dum la tri-taga programo okazos kelkaj diskutoj pri Esperanto kaj ELNA kaj okazos kunsido de la membraro. Estos prezentadoj kaj seriozaj kaj humoraj, por informi, pensigi, kaj amuzi. La libroservo de ELNA aperos ĉe la kongreso kun ekzempleroj de plej diversaj libroj, kompaktdiskoj, kartoj, pingloj, ktp. Se vi neniam trafolumis Esperanto-librojn antaŭ aĉeto, la kongreso estos la okazo. Vespere, ni vidos la pireteknikaĵojn, ni bankedos, ni aŭskultos muzikon, ni dancos. Poste, eblos plu festi kun la muzikistoj kaj junuloj en lokaj kafejoj aŭ dancejoj. Dum la tagoj

eblos ekskursi en urboj de Boston kaj Cambridge.

Boston kaj la apudaj urboj estas historiplenaj. Eblos promeni inter la malnovaj konstruaĵoj kaj famaj lokoj de la frua usona historio. Eblos viziti la brikajn konstruaĵojn de Universitato Harvard, la ŝtonajn fasadojn de MIT, aŭ la terenojn de la pli ol 200 altlernejoj en la bostona regiono. Eblos vidi la famajn bostonajn pireteknikaĵojn por festi la usonan sendependiĝ-tagon dum kiu koncertos la Bostona Simfonia Orkestro.

La kongreso okazos en Cambridge ĉe la tereno de la Masaĉuseca Instituto de Teknologio, kie Esperanto-kurso aperis jam en 1909 instruata de la ĝermanlingva fakultato, kaj kie dum la lastaj jardekoj agadis studenta Esperanto-klubo. Ĉeestantoj de la kongreso povas tranokti en studentaj dormĉambroj aŭ en hotelo kiu ofertas al kongresanoj ege rabatitan prezon kiu kontraŭdiras la nekredeblan luksecon. Ambaŭ lokoj estas proksimaj al la kongresejo, kaj de ambaŭ, ĉeestantoj havos bonegajn superrigardojn de Cambridge, Bostono, kaj la rivero inter la du.

Post la kongreso eblos facile

Daŭrigo sur p. 11 - KONGRESO

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

☎ 510/653-0998; ☎ 510/653-1468
✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Alexander Shlafer
Vice President/Vicprezidanto: Phil Dorcas
Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Don Coleman, Peggy
Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow,
Orlando E Raola, Jacob Schwartz, Tim
Westover, David Wolff

*Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky
*Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de
la Centra Oficejo:* Donald Harlow

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the
Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 39, No. 1

ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Don Harlow

☎ 510/653-0998; ☎ 510/653-1468
✉ donh@esperanto-usa.org

Materials for esperanto usa should be
sent to/Materialojn por esperanto usa
oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

or by e-mail/aŭ retroŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin
are those of the authors, and don't neces-
sarily represent the point of view of ELNA
or its bulletin/La opinioj esprimitaj en ĉi
bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne
nepre prezentas la vidpunkton de ELNA
aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted materi-
al is sent to ELNA/Estas permesate
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj
ke oni sendu ekzempleron de la repu-
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2003/3/Limdato por
numero 2003/3: 28.05.2003

A Resolution, adopted in the (completely
English-speaking) XXIV World Congress
of the World Federalist Movement on
Monday, July 15, 2002, in London, United
Kingdom:

WHEREAS a democratic world federation
requires the exchange of ideas among
everyone in the world community,

WHEREAS the Esperanto movement
supports the World Federalist ideals of
world citizenship and the equal rights of

all members of the world community,

WHEREAS this organization [WFM] in
1977 adopted a resolution supporting the
use of Esperanto by World Federalists,

WHEREAS the World Federalist
Movement is a member of the Coalition
for an International Auxiliary Language,

BE IT RESOLVED THAT the World
Federalist Movement encourage its
members to learn the non-national
language Esperanto.

ESPERANTO AND WORLD FEDERALISM

*presented by Prof. Ronald J. Glossop, at the
World Congress of World Federalists, London,
14 July 2002*

Ladies and Gentlemen, Greetings
and welcome to our meeting,

My name is Ron Glossop. I live
in the city of St. Louis in the coun-
try of the United States of America.
I am an Esperantist, and I also am
a World Federalist.

It is a strange affair to me that
not many Esperantists are world
federalists and not many world
federalists are Esperantists. Why
does this surprise me? Because the
general viewpoint of these two or-
ganizations is very similar. Both
groups see themselves as citizens
of a whole-world community
which is becoming as important as
their national communities, but
at the same time they do not want
to totally eliminate those national
communities and their languages
and cultures.

Here is the situation. If we
want to be world citizens living in
a peaceful and just world commu-
nity, we will need to have a demo-
cratic world federation. The na-
tional governments would still
deal with national problems, but
the global government would be
able to deal with our important
global problems. We also will need
a common neutral whole-earth

language so that all members of
the global community will be able
easily to communicate with one
another. Furthermore there would
be a feeling of planetary solidar-
ity because we all could commu-
nicate in the same language even
though many other differences
remain.

The acquiring of justice is an
important aim for both groups. For
world federalists, the present in-
ternational system of several or-
ganizations controlled by élites in
a few powerful countries produces
a situation where a majority of
people in the world have no
chance to influence the policies
that govern the world. For Espe-
rantists, the present international
communication system is simi-
larly controlled by those who use
only one or a few national lan-
guages. The other languages are
simply ignored and exterminated.
Less than 5 percent of humans on
the Earth live in the United States,
and less than 6 percent of humans
use English as their first language.
Nevertheless the United States of
America politically dominates the

Daŭrigo sur p. 3 - WF

Pagitaj Membroj?

De Donald J. Harlow

Antaŭ kelkaj monatoj, multjara kompetenta esperantisto, parolante pri sia loka klubo, menciis la nombron de "pagitaj membroj". Antaŭnelonge, mi vidis precize la saman esprimon en retmesaĝo sendita de pli nova esperantisto. La esprimo estas, en la koncerna kunteksto, erara. Sed ne nur ili faras tiun eraron; mi iam vidis, en la "Letero de la Akademio", en artikolo verkita de la tiama Prezidanto de la Akademio de Esperanto, la simile eraran esprimon "avancita civilizacio". Kaj aliloke ...

En la angla (kaj supozeble aliaj

okcidenteŭropaj lingvoj) troviĝas pasea participo, kiu povas esti aŭ aktiva aŭ pasiva, depende de la semantiko de la vorto kaj/aŭ la cirkonstancoj, en kiuj ĝi aperas. Ĉar tiu participo havas nur unu formon, oni emas uzi simile unu formon en Esperanto. Sed Esperanto havas *du* formojn – unu specife por la aktiva uzo, unu specife por la pasiva uzo.

"Pagitaj membroj"? Mi ja volus esti "pagita membro" de iu asocio!!! Bedaŭrinde, oni kutime postulas kotizojn, ne pagas salajrojn, ĉe siaj membroj; do fakte oni kutime estas

"pagiNta membro", t.e. membro, kiu pagis. Simile, civilizacio povas esti "avanciNta" sed ne "avancita", malgraŭ tio, ke la angla vorto havas pasivan formon (sed ne signifon): "an advanced civilization", t.e. a civilization which has advanced (civilizacio kiu avancis [*]).

Kiam vi vidas la anglan -ED aŭ ties neregulajn ekvivalentojn (ekze -EN en *fallen*), aux la francan -Ê(E), ne aŭtomate uzu -ITA en Esperanto; ne malofte, la signifo postulas -INTA.

—
(*) Ŝajne, la ĝusta vorto devus esti "progresinta".

WF - Daŭrigo de p. 2

world, and the English language dominates international communication. Both World Federalists and Esperantists believe that this unjust situation in the world must be changed.

The *enemies* of both movements make the same kind of false accusations that, if their proposals were adopted, diversity would be sacrificed to unity. Maybe you have heard them. The enemies of a democratic world federation talk about "one-world government," ignoring the fact that a world *federation* actually would preserve the national governments. The enemies of Esperanto ignorantly claim that the adoption of Esperanto would destroy the national languages instead of being a supplemental global language which would permit the continuation of the national languages. These opponents of the two proposals for change apparently do not realize that it is precisely the existing international system

which is undermining the governments of the less powerful countries and which is destroying the national languages of the smaller ethnic groups.

It is recommended to both groups that they just give up because their beautiful goals are too utopian and never will be realized. World federalists hear that national governments never will surrender any of their sovereignty to create a global federation. Esperantists hear that Esperanto is a designed language that can't function like "natural" languages and that communities create languages but a language cannot create a community. In both cases the alleged "proof" is not totally clear. One must think long-term instead of short-term. There are always the skeptics like those who said that the United States and the European Union would not be possible and that one could not introduce a new language in Israel or in Indonesia. If our goals are noble, we must work to overcome the obstacles, not give in to the cynics.

World federalists and Esperantists must have a greater realization of how much we need each other. Without a democratic world federation with its world parliament, the issue of which language(s) should be used by the world community probably will never be deliberately discussed. The trend toward ever more widespread use of the irregular, nonphonetic, difficult-for-foreigners-to-learn English language will probably continue, and the number of different languages in the world will undoubtedly decrease rather quickly. On the other hand, without a neutral, totally phonetic, readily learnable common language such as Esperanto, a democratic global-level federation would not be able to function well, nor would it have the sense of a justly founded solidarity to prevent its break-up into linguistically diverse parts.

So, my conclusion is: All world federalists should be Esperantists, and all Esperantists should be world federalists.

Revigliĝo!

Joel Brozovsky

Bonvenon al la tria jaro en la jarmilo! Ĝis nun, la nova jarmilo aspektas tro simila al la antaŭa: perforto, milito kaj skandalo ankoraŭ dominas la novajelsendojn, sed la vera vivo plu konsistas el la konstruo, brikon post briko, de pli justa, tolerema, kaj paca socio. Komunikado altkvalita kian ebligas Esperanto pli kaj pli necesas kiel la mortero por tiuj brikoj. Ŝajnas ke tiu bezono estas pli sentata, ĉar mi vidas plurajn indikojn, ke la Esperanto-movado plivigliĝas.

Membriĝoj

Malgraŭ la malfrua dissendo de realiĝiloj por 2003, vi fidelaj membroj senprokraste sendas al ni viajn kotizojn kaj abonojn, foje kun mendoj. Dankon! La nombro de membroj fine de januaro verŝajne proksimos al tiu lastjara, kvankam tiam temis pri pli ol du monatoj da respondtempo post la dissendo de la aliĝiloj kontraste al nur unu monato nun.

Vi ne nur senprokraste realiĝas, sed venas ankaŭ pluraj novaj membroj, kaj kelkaj dekoj da aliĝoj al la Gvidrondo (en la aliĝilo nomata "Leadership Circle"). Krome, multaj el vi sendas ankaŭ donacojn al iuj el niaj fondusoj. Kun tia malavara subteno, mi esperas ke ni povos daŭrigi nian servadon. La estraro estos jam konsideranta la situacion kiam vi legas tion ĉi, sed ne estas tro malfrue sendi vian subtenon. ELNA bezonas la helpon de ni ĉiuj, kunlaboron por disvastigi kaj instrui Esperanton, kaj ankaŭ financan subtenon por daŭrigi nian oficejon.

Lokaj kontaktoj gravas

Por helpi novajn esperantistojn kaj interesatojn lerni kaj ekuzi la lingvon, estas tre grave havi lokajn kontaktpersonojn al kiuj ni povas sendi novulojn. En kelkaj urboj troviĝas organizitaj grupoj al kiuj ni povas sendi serĉantojn. En aliaj lokoj ekzistas retpoŝta dissendlisto regiona, per kiu oni povas kontakti esperantistojn tiuregionajn. Sed en Usono ankoraŭ estas multaj urboj kaj regionoj sen tiaj kontaktoj. Estas tre bedaŭrinde kiam ni devas diri al novulo, "pardonon, sed en via regiono ne ekzistas Esperanto-grupo, kaj ni ne povas doni al vi kontaktinformon de loka esperantisto". Tio certe ne kuraĝigas la interesaton!

Ni petas, do, se vi pretas esti kontaktpersono (ni tre volonte havos plurajn kontaktpersonojn en la sama urbo!) al kiu ni povos sendi novulojn, bv sciigi nin en la Centra Oficejo.

Lokaj grupoj aktiviĝu

En la lasta numero de 2002 aperis anonco de programo por instigi lokajn grupojn pliaktivigi. Nia vicprezidanto Phil Dorcas lanĉis la Inter-Grupan Atingan Programon (Igapo). Ĝi estas parte konkurso, parte sistemaj helpo kaj subteno al lokaj grupoj. Por partopreni, ne necesas esti formale organizita grupo. Grupo povas esti, en la komenco, nur unu persono kiu deziras arigi ĉirkaŭ si esperantistojn por kunagadi, kunlerni, aŭ kune umi Esperante.

Ĉiu kiu interesiĝas pri loka agado, pri praktiko de la lingvo, profitu tiun ĉi okazon stimuli la lokulojn en via regiono! Vidu la informojn en *Esperanto USA 2002/6*, aŭ en la ttt-ejo www.esperanto-ntx.org/grupoj, aŭ kontaktu la komisiiton pri lokaj grupoj, Phil Dorcas, ĉe pdorcas@sbcglobal.net por interkonsiliĝi.

Esperanto plias antaŭ la publiko

Kelkaj homoj raportas pliiĝon de

pozitivaj artikoloj kaj mencioj pri Esperanto en la ĝenerala gazetaro en la lastaj monatoj. Frue en januaro aperis en la *Los Angeles Times* kaj ankaŭ en la *Baltimore Sun* artikolo pri Forrest J Ackerman kun pozitiva mencio de lia esperantisteco. En la *Philadelphia Inquirer* aperis bona artikolo pri Esperanto de Marc Schogol de "Knight Ridder Newspapers" kiun represis multaj ĵurnaloj ne nur tra la lando, sed eĉ en Azio!

Tre bona artikolo pri la Esperanto Society of Metro Atlantis aperis en la *Cherokee Tribune*, 2003 jan 25, kun foto kaj intervjuo de aktivuloj Joel Amis kaj Sean Woodstock.

La *Valley Morning Star* (2003 jan 20), la ĵurnalo de la regiono Rio Grande en Teksaso, publikigis bonan artikolon pri Prenda Cook, instruisto de Esperanto. En la sekvaj semajnoj aperis du bonaj reagoj al tiu artikolo en la rubriko *Leteroj al la redaktoro*, de Scott Redd en Nebrasko kaj Gary Grady en Nordkarolino. Tiel la efiko de la bona artikolo estis pliampleksigita; Esperanto aperis antaŭ la legantaro jam tri fojojn ene de du semajnoj. Kiel okazas, ke tiaj reagoj al loka ĵurnalo venas de tiom malproksime? Nu, Scott kaj Gary ambaŭ apartenas al la retpoŝta dissendgrupo *reago*, kiun starigis Don Harlow ĝuste por periodajn reagojn al la amaskomunikiloj. La artikolo pri Prenda estis dissendita per tiu dissendlisto, kaj tiel ne gravas kie loĝas la esperantistoj, ili povas sendi sian reagon rete al la redaktoroj kie ajn aperas reaginda mencio.

Tiu dissendlisto *reago* estas tutmonda. Kiam lastjare aperis en la *San Francisco Weekly* tutpaĝa artikolo pri Esperanto kun intervjuo de mi, venis pluraj reagoj de malproksime, kaj oni publikigis tri el ili, el Argentino, Svislando, kaj Nordkarolino (Dankon Gary!). En la listo aperas artikoloj origine en diversaj lingvoj, el la tuta mondo, ofte kun resuma traduko de la Esperant-koncernaj partoj. Homoj sendas

Daŭrigo sur p. 7 - CO

20 Ways to Strengthen the Esperanto Movement

by Joel Amis

As ordinary Esperantists or Esperanto supporters, we often wonder just what we can do to strengthen and support our Movement. There are a few very obvious ways (be a member of Esperanto organizations, donate money, which, I might add, are also very, very important ways to support the Movement) but there are many other less obvious, and often quite simple, things we can do to support Esperanto. Here is a list of some things we can all do, to a greater or lesser degree, to contribute.

- Learn to read, write and speak Esperanto fluently.
- Join and actively support your local Esperanto group and if there isn't one, work with nearby Esperantists to create one.
- Join and actively support ELNA.
- Join and actively support UEA.
- Share your positive experiences in the Esperanto community with your family, friends and co-workers.
- Attend various Esperanto conventions and conferences in the U.S. and throughout the world (ex. ELNA convention, UK (Universala Kongreso), IJK (Internacia Junulara

Kongreso).

- Always speak Esperanto with other Esperantists (who are already fluent), even if you share the same mother tongue.
- Financially support Esperanto organizations above and beyond your annual dues.
- Defend Esperanto wherever you see it being attacked, ridiculed or trivialized (David Wolff's "Questions and Answers about Esperanto" is a good source of responses to common questions and criticisms).
- Travel using Pasporta Servo and share your experiences with family and friends, emphasizing the practical uses of Esperanto here and now, as well as the opportunities to meet interesting people.
- Join and support special interest Esperanto organizations that use and promote Esperanto in your areas of religious, political, hobby or professional interest.
- Thoroughly familiarize yourself with the history and culture of Esperanto, as well as the rational scholarly arguments in favor of Esperanto. Be prepared to use such knowledge to combat misconcep-

tions, prejudices, ignorance and misinformation about Esperanto.

- Become an UEA delegate for your city or region.
- Support Esperanto publishing by buying and reading Esperanto literature, and support the Esperanto press by subscribing to and reading Esperanto periodicals.
- When working with other Esperantists, strive for maximum solidarity and unity; petty bickering and infighting do nothing but weaken our Movement.
- Donate Esperanto textbooks and informational books to local public, school and university libraries which don't yet have such material.
- Volunteer your professional skills and abilities in service of the Esperanto Movement (ELNA's Talent Bank is set up to help you do this).
- If you can, become a life member of ELNA and UEA.
- Encourage others to join ELNA and UEA.
- Put the Interna Ideo into practice; support movements with progressive goals, similar, related to or favorable to the goals of the Esperanto Movement.

Saluton USEJ-anoj!

Ekzistas multe da aktiveco en la Esperanta junularo en Usono. Pli kaj pli da novaj Esperantistoj aperas en la Interreto. Espereble, la nova TTT-ejo, **Lernu!**, kontribuos al plia pliigo de novaj parolantoj.

Ĉu vi ne jam vidis la Lernu!-paĝaron? Vizitu <http://lernu.net> kaj vi vidos la freŝan laboron de TEJO (la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj la laborgrupo **Esperanto@Interreto**. **Lernu!** estas nova retejo por lerni Esperanton rete kaj senpage. Estas tie kelkaj kursoj kiujn lernantoj povas trastudi. Ekzistas serĉebla vortaro kaj eblas alklaki vortojn en

la tekstoj kaj tuj vidi tradukon. Ekzistas vortlerniloj, sondosieroj, kaj mesaĝilo por komuniki kun aliaj lernantoj kaj helpantoj. **Lernu!** estas ilo-plena kaj belaspekta kaj tre ĝuebla maniero por lerni Esperanton per la reto.

Do malgraŭ pli da vicleco en la junulara komunumo, organizita laboro de USEJ mankas. Mankas daŭraj planoj kaj aktivuletoj por realigi ilin. Ni komencas korektigi tion. USEJ baldaŭ havos "vikion" (komune redakteblan retpaĝaron) per kiu ni povos interŝanĝi ideojn kaj konservi ellaboraĵojn kaj listojn de taskoj kaj prioritatoj, kaj per kiu

la laboro de USEJ estos pli videbla kaj pli alproksimiĝebla de novaj aktivuloj. Sed por sukcesigi, ni bezonos vin! Do kiam aperos la "vikio," tralegu kaj kontribuu viajn ideojn.

Ni volas atentigi vin pri du proksimaj eventoj. La unua estas la Printempa Esperanto-Kunveno en Nord-Karolino. Ĝi estas regiona renkontiĝo kaj ni volas kuraĝigi ĉiujn junulojn (kaj aliajn) en la regiono ĉeesti. Pli legu sube. La dua evento estas la venonta seminario *Esperanto@Interreto* kiu

Daŭrigo sur p. 7 - USEJ

[La jena recenzo unue aperis en La Semanto, la bulteno de The Esperanto Society of Michigan. Represata kun afabla permeso de la verkinto.]

Zaft, Sylvan: Esperanto: A Language for the Global Village. Calgary: Esperanto Antaŭen, 2003. 157p. ISBN 0-7795-0031-8. Ĉe ELNA: Kodo ESP013, Prezo \$15.00

Flanke de mia lito, je la nivelo de la kapkuseno, estas breto. Sur ĝi troviĝas hazarde ĵetita monteto da libroj. Supre, la plej ofte foliumata, *La Bona Lingvo*. Pravas la verkisto kiam li diras, "Homo, kiu legas sian Esperanton, en formo pli arta, sed ne pli komplika ol li (aŭ ŝi) povas uzi ĝin, sentas sin portata supren." (p. 110)

Kia bedaŭro ke tiel malmultaj el miaj samlandanoj kapablas ĝui ĝin. Sed Claude Piron verkis ankaŭ alian plezure legindan libron, *Le Défi des Langues*. Al miloj de miaj samlandanoj oni instruis dum jaroj la francan lingvon; tiun-ĉi ili kapablas legi, ĉu ne? Bedaŭrinde, ne. Lerneja lingvo-instruado donas nur malmaturajn fruktojn.

Kiam Sylvan Zaft legis *Le Défi des Langues* li konstatis ke anglalingvanoj urĝe bezonas similan libron. Rekta traduko ne taŭgus, do Zaft decidis klarigi anglalingve la mesaĝon de Piron: kiel ege malfacile oni povas majstri fremdan lingvon, kaj kiel normale kaj institucioj kaj informiloj rifuzas agnoski tian malfacilaĵon. Li montras kiom da tempo kaj laboro junuloj malŝparas por eta gajno kaj kiel mensogaj estas la promesoj ke per iu KD-ROM oni povas post pluraj semajnoj bone paroli novan lingvon.

Krome, Piron, kiu longe laboris ĉe UNO kaj Monda San-Organizaĵo kalkulis la terurajn kostojn de tradukado kaj interpretado, kun iliaj neeviteblaj mankoj kaj fuŝoj.

Tiujn-ĉi informojn Sylvan Zaft sukcesas klarigi, ne nur per informoj sed per detalaj ekzemploj; li ne diras, ke angla literumado estas nelogika, li montras liston de 13 manieroj literumi la sonon de O en "Go". Poste, li listigas multajn aliajn manierojn prononci tiujn 13 litergrupojn [grafemoj]. Fine de tiu ĉapitro Zaft skribas ke post mil horoj da studado de angla literumado, fremda studento ne kapablas tiel bone literumi kiel komencanto povas literumi Esperanton [artikoloj en *Eventoj* 212 raportis sciencan studon: la angla lingvo reprezentas 62 fonemojn per ne malpli ol 1 120 grafemoj]. Zaft prave rakontas ke eĉ kleraj denaskaj parolantoj spertas problemojn.

Laŭeble la plej grava ĉapitro estas tiu en kiu li klarigas la rolon de *ĝeneraliga asimilado*. Nia cerbo nature asimilas elementon kaj tuj ĝeneraligas ĝin uzon ekster la kampo de la jam akiritaj scioj kaj spertoj. Zaft diras ke la problemoj kiu iom malfaciligas akiron de angla lingvo je angla-parolantaj infanoj, kaj ege malfaciligas ĝin je fremdaj lernantoj, estas ke tia ĝeneraligo ofte pravas sed tro ofte malpravas, kaj nenie la lernantoj povas antaŭvidi la bonan solvon. Samas la plejmulto da lingvoj; nur Esperanto fidindas.

Mi bedaŭras eraron en la dua ĉapitro; en 1922 la Asembleo de la Ligo de Nacioj unuanime akceptis la Rezolucion favore al enkonduko de Esperanto en la lernejojn de la Nacioj. Nur poste la franca delegitaro sukcesis flankenŝovi ĝin. D-ro Nitobé Inazo, kiu instigis la enketon, komentis, "Post dudek jaroj, oni ridos je ni". Ĉu multaj ridis en 1942?

Eble Sylvan Zaft saĝe elektis ne fidele sekvi la planon de Claude Piron en *Le Défi des Langues*. Ĉi-tiu tra 161 paĝoj priskribis lingvajn problemojn je ĉiuj niveloj; pri la solvo li silentis ĝis paĝo 165. Ŝajne ideala

plano. Sed ĉi-jare Piron rakontis rete ke dum iu kunveno franca faka lingvisto renkontis lin kaj demandis, ĉu estis li kiu verkis *Le Défi...?*

"Mi gratulas vin. Jen vere mirinda libro. Sed, kompreneble, kiam mi renkontis la vorton 'Esperanto' mi ne plu legis."

Male, Zaft defias vid-al-vide la kredon de la plej-povaj ŝtatoj. Li asertas firme, je la unua paĝo, ke Esperanto povus, se oni dum unu aŭ du jaroj instruus ĝin tra la mondo, kapabligi normalajn homojn interkomunikiĝi pli bone ol nun povas la plej lertaj lingvoparolantoj kaj li substrekas la grandegan koston, la malŝparon de dolaroj kiuj povus savi la sanon kaj la vivon de tiel multe da homoj.

Kaj poste li pentras allogan bildon de la sonĝo de tiu ebla terglobo, plenplena de amikeco.

Mi ne nur rekomendas ĉi-tiun libron; mi intencas tuj mendi plurajn ekzemplerojn.

Máire Mullarney

Esperanto Outreach

In the Caribbean country of the Dominican Republic, Esperanto is almost unknown – almost, but not completely. Rafael Despradel, a young language teacher, began the first Esperanto course in the country in January of 2002. He has volunteered in the Central Office of UEA, participated in UK and IJK (adult and youth world conferences) in Zagreb and Strasbourg respectively, and learned the "Cseh Method" of teaching Esperanto.

Rafael has been invited to participate in the summer Esperanto courses (NASK) this July in Vermont. The American Commission of UEA and the NASK Fund are helping to pay his expenses there, but there is still need to help with his airline ticket, and, if possible, his expenses at the ELNA Conference in Boston. Tax-deductible contributions can be sent to ELNA (with indication "for Rafael"). Thanks!

Joel Brozovsky

CO - Daŭrigo de p. 4

siajn reagojn al la redaktoroj, aŭtoroj, kaj kopie al la listo. Tiu ĉi simpla rimedo montriĝas tre efika por pli bone diskonigi Esperanton al la mondo. Vidu mem ĉe <http://groups.yahoo.com/group/reago>; aliĝu al la listo por reale kontribui al nia celo.

Ne nur en Usono plimultiĝas informoj pri Esperanto, sed ankaŭ en aliaj mondpartoj. Regula kontribuanto de la listo Claude Piron en Svislando skribis, "Nekutime, la radiaj, televidaj kaj la gazetaj ĵurnalistoj en Belgio multe pli ofte raportas pri Esperanto ekde kelkaj monatoj. Ankaŭ en franclingva Svislando aperas la

sama fenomeno." Li donas plurajn ekzemplojn, kaj komentas, "Dufoje mi estis petita prezenti Esperanton al 'eksjunulaj' publikoj. Interese estas, ke ne esperantistoj iniciatis la prelegojn, sed tiuj asocioj petis ilin."

Alia regula kontribuanto en Francio, Henri Masson, kompilas liston de publikaj aperoj de Esperanto en Francio. Lasttempe, li devis ŝanĝi sian ĝisnunan politikon inkluzivi ĉiujn menciojn, ĉar estas tro multaj! Li nun listigas nur la ĉefajn artikolojn.

Io nova en la libroservo

Ĉiunumere en *Esperanto USA* aperas listo de novaj libroj, KD-oj, ktp

vendataj en nia libroservo. La vario de ofertoj kreskis en la lasta jaro inter 5% kaj 10%. Profitu la okazon pliampleksigi vian libraron kaj vian vivsperton!

En la lasta numero anonciĝis io tute nova al ELNA: ekfunkcio de donackuponoj. Se vi volas kuraĝigi novan esperantiston pli lerni kaj uzi Esperanton, sed ne certas kio plej taŭgus por tio, konsideru donaci kuponon kaj lasi al la kuraĝigato elekti la librojn plej deziratajn. Niaj donackuponoj kostas kaj valoras 25 dolarojn. Ili uzeblas por iu ajn varo en nia katalogo, kaj validas dum tri jaroj ekde la aĉeto (renovigebla por unu jaro se oni tion petas antaŭ ĝia eksvalidiĝo). Taŭga donaco por iu ajn esperantisto aŭ interesato!

USEJ - Daŭrigo de p. 5

okazos en Bostono! E@I estas organizo kiu rekonas ke kaj Esperanto kaj la Interreto estas iloj por pli faciligi interkomunikon, kaj do E@I subtenas pli da uzo de la Interreto en Esperanto kaj pli de Esperanto per la Interreto.

